20 AFEROJ

KIUJN VI VERŜAJNE NE KONIS PRI LA EŬROPAJ LINGVOJ

LA FAJFA LINGVO AŬ "SILBO"

el La Gomera, Hispanio, estas malnova lingvo bazita sur fajfado kiu ankoraŭ estas lernigita en la lokaj lernejoj.

LA MALTA LINGVO

estas la sola eŭropa lingvo de la afro-azia familio (kiu ankaŭ inkluzivas la araban, la hebrean, la tamaziĥtan kaj la haŭsan).

Laŭ sduto, ne gvaars la odro laŭ kiu la lretioj etsas siitbarkj, la sloa gvara arefo etsas, ke la uuna kaj la ltsaa ltiorej etsu en la ĝtsua suito. La rteso pvaos etsi ttue snreoda kaj oni pvoos lgei ĝin ĉar oni ne lgaes ĉiu lretio de la vtroo, sed ĉiu vtroo de la fzaro.

LA EŬSKA LINGVO

estas konsiderata unu el la plej malnovaj lingvoj de Eŭropo. Ĝia deveno estas nekonata.



La rusa estis la unua lingvo parolita en la **EKSTERA SPACO**.

LA LITOVA LINGVO

estas tre simila al la antikva sanskrita. Ĝi ankaŭ estas la plej malnova indo-eŭropa vivanta lingvo.

Oni pensas, ke antaŭ preskaŭ

70.000 JAROJ

okazis ŝanĝo en la homa cerbo kiu permesis al la homoj subite disvolvi kompletan lingvon kaj pensadojn pri aferoj kiu ne estas rekte videblaj. Tio kaŭzis la kapaciton koncepti idejojn, planojn, kredojn kaj konceptojn pli vastajn kaj esprimi ilin per la lingvo.

Pli ol duona Eŭropo estas **DULINGVA**.

La lingvoj havas preskaŭ

50.000

vortojn aŭ pli.
La denaskaj parolantaj konas inter

15.000 kaj 20.000

vortojn, sed normale oni uzas malpli ol mil.

En Eŭropo estas preskaŭ

225 INDIĜENAJ LINGVOJ,
proksimume 3% de la monda totalo.

αβγδε

Vi verŝajne scias multe pli da greka lingvo ol vi pensas! Vi certe konas alfan, betan, deltan, gaman, kaj eble π kaj ρ. Fakte, matematiko, astronomio, biologio, geografio, teknologio, filozofio, same kiel politiko, demokratio, kaj multaj aliaj komunaj terminoj en eŭropaj lingvoj havas siajn originojn en la greka!

ř

ĈU LA PLEJ MALFACILA DE ELPAROLI?

Oni diras, ke la ĉeĥa litero ř estas unu el la plej malfacilaj por elparoli en la tuta mondo, krom se vi estas ĉeĥa!



EĈRML (AŬ EŬROPA ĈARTO POR REGIONAJ KAJ MINORITATAJ LINGVOJ)

de la Konsilio de Eŭropo estas la sola ilo en la mondo kies celo estas stimuli kaj protekti la tradiciajn lingvojn de malplimultoj regionaj aŭ naciaj.

La gepatraj lingvoj de la plejmultaj eŭropanoj estas la rusa, la germana, la franca, la angla kaj la turka, en tiu ĉi ordo.



Unu el la ĉefaj normoj ortografiaj de la serba estas

"SKRIBU TIEL, KIEL ONI ELPAROLAS KAJ ELPAROLU TIEL, KIEL ONI SKRIBAS".

Tio signifas, ke ankaŭ la alilandaj vortoj kiuj alvenas al la serba el aliaj lingvoj estas transkribitaj konforme al la serba elparolo: New York estas Njujork, kaj Gérard Depardieu estas Žerar Depardje.

Oni kreis pli ol

200 NEVERAJ LINGVOJ

por la literaturo kaj la kino (kiel la elfa de "La Mastro de l'Ringoj" kaj la klingona de "Star Trek").

Freŝaj medicinaj studoj demonstris, ke la lernado de dua lingvo POVUS malfruigi la aperon de **DEMENCO** iom da jaroj.

LA HINDĜERMANAJ LINGVOJ

derivas de antikva lingvo, kiu ekzistis antaŭ 4.000-5.000 jaroj. La plej multaj etnologoj kaj lingvistoj ligas ĝin al civilizoj, kiuj vivis en la regiono de la Kaspia Maro. De tie, ĝi disvastiĝis al Eŭropo kaj ankaŭ al Barato.

Laŭ la UNESKO, almenaŭ

43%

de la 6.000 lingvoj estas en **EKSTINGIĜDANĜERO**.

KINSHASA,

la ĉefurbo de la Konga Demokrata Respubliko, estas la dua urbo de la mondo kun plej da francparolantoj, post Parizo, kaj antaŭ Montréal kaj Bruxelles.

Eŭropa Tago de la Lingvoj
26a de Septembro

WWW.COE.INT/EDL #COEEDL

EUROPEAN CENTRE FOR MODERN LANGUAGES
CENTRE EUROPEEN POUR LES LANGUES VIVANTES

COUNCIL OF EUROPE
CONSEIL DE L'EUROPE

2021-EO